

LAŬOKAZA NOVAĴLETERO

Organo de la Internacia
Komerca kaj
Ekonomia
Fakgrupo

[Provizora sidejo ĉe:]
Hornisgrindestrasse 8,
7580 Bühl 16,
FR Germanio

23-07-1987

Numero 17

Julio 1987

IKEF-kunveno en Rastatt, F.R. Germanio

En la kadro de la ĉi-jara 65a Germana Esperanto-Kongreso en Rastatt dum Pasko 1987 okazis kunveno de ĉeestantaj IKEF-membroj. Parto-prenis s-roj d-ro Bormann (IKEF 27,) Braun (4), Cwik (50), d-ro Gether (7), Herrmann (53), König (54), Pachter (34) kaj interesito Dengler.

La ĉefa temo por la pridiskuto estis la ĵus aperinta kaj de d-ro Gether kunportita „Laŭokaza Novaĵletero” n-ro 16. La ĉeestantoj juĝis la novan aspekton de tiu numero bona kaj plaĉa, kvankam plibonigoj ankoraŭ eblas. Ekzemple oni konsentis, ke ĉe tia ampleksa LN estus nepre necesa tabelo pri enhavo sur paĝo 2.

Plia decido estis, ke ni bezonas novajn varbfoliojn por IKEF, kiujn ni devas prezenti en Varsovio. S-ro Braun preparos la tekston, la presado okazos en Hungario.

Granda intereso montriĝis pri insigno por IKEF. Ni volas nun alvoki desegnistojn/grafikistojn kaj aliajn tiurilatajn spertulojn inter ni, por ke ili skizu kaj desegnu belan kaj simbolan insignon por IKEF.

Viajn proponojn bonvolu sendi al la redaktoro.

Franz Josef Braun

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

La Estraro:

S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝen. Sekretario

S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto

D-ro István Gether

S-ro Francois-Xavier Gilbert

S-ro Lawrence Mee

D-ro Marco Picasso

Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco Polerani

Centra sidejo (provizora):

Hornisgrindestr. 8

D-7580 Bühl 16 (FR Germanio)

Financa sidejo:

Visspanstraat 97

B-8000 Brugge/Belgio

Ĝenerala Kunveno de IKEF okazos en Varsovio dum la UK

Loko kaj dato troveblas en la UK programo.

ENHAVO

IKEF-kunveno en Rastatt

IKEF estraro, enhavo

Fiŝkaptista Foiro, Ancona

Financa Raporto reviziita

ICC - vortlisto

Ĝuu la Terminologian Ludon

Nova Eŭropa Dogandokumento

Pagoj - Perantoj - Kotizo

Identecŝildoj

Ekonomia agado de ne-ekonomisto en Hongkong

Higiena saketo

Lernejkoooperativa Movado en Hungario

Reklamanoncoj, aliĝilo

Paĝo

1

2

3

3

4

5

6

6

7

8

9

10

12



ENTE AUTONOMO
FIERA DI ANCONA



Fiŝkaptista Foiro Ancona 4 ĝis 7 junio 1987



A la Fiŝkaptista Foiro estis invititaj du IKEF-membroj ne-italaj, laŭ interveno de itala IKEF-ano d-ro Picasso:

- S-ro Mboge Mbele el Kameruno restis ĝis dimanĉo kaj poste vojaĝis al Hungario kaj al la UK en Pollando;

- S-ro Roland Rotsaert el Belgio restis ĝis sabato.

La gastoj estis bone akceptataj en la flughaveno kaj prizorgataj de lokaj franc- kaj anglalingvaj gvidantoj.

Ancona estas ne nur fiŝkaptista urbo, sed ankaŭ grava haveno por permara transporto, i.a. al Greklando kaj Turkio (por varoj el norda kaj okcidenta Eŭropo). Kvankam tio estas preskaŭ nekonata eksterlande, ankaŭ el turisma vidpunkto Ancona estas alloga.

Roland Rotsaert



Financa Raporto reviziita

Nia revizoro, d-ro Gianfranco Polerani, Milano, avizis la plenumitan ekzamenon de la financa raporto por 1986. Li konfirmis, ke spezoekonto kaj bilanco estas en ordo. Dankon al li, kaj ankaŭ al s-ro Rotsaert.

jarbazararo
sorto
stato de enkasigo
stato de varoj
difekta
kosto, pago
patentimposio
enkasigajkostoj
konsuleja imposto
honorario
prokuristo
kaŭcio
financistaro
ekipejoj

flago de konveno

preferlaso
ago kaj preterlaso

valida
devizo
puno
?
?

falsado

formala sciigo

368 fair
369 fate
a/1...of a collection
b/1...of goods
370 faulty
371 fee
a/annual patent f...
b/collection f...
c/consular f...
d/fees
372 fiduciary
a/1...bond

373 financial status
374 fittings and fixtures

375 flag of convenience

376 forbearance
a/act and f...

377 (in) force
378 foreign currency
379 forfeiture
a/1...clause
b/1...of premiums

380 forgery

381 formal notice

Messe
Schicksal, Stand
a/Stand des Inkassos
b/Schicksal der Waren
Fehlerhaft, Mangelhaft
Gebühr, Taxe
a/Jahrespapentengebühr
b/Inkassogebühr
c/Konsulargebühren
d/Honorar
Treuhänder
a/Kautionsverpflichtung

Finanzstatus
Betriebs- und
Geschäftsausstattung,
Einrichtung und Zuehör
Heimatflagge (Staaten mit
Registrierungsvorteilen)

Unterlassung
a/Handlung und
Unterlassung

geltend, in Kraft
Devisen
Verlust, Busse
a/Verwirkungsklausel
b/keine Rückerstattung

Verfälschung, Fälschikat

förmliche Anzeige

feria, salon, exposición
suerte
a/resultados (de gestión)
de un cobro
b/s...de sal mercansías
defectuoso
derecho, impuesto
a/annualidad
b/gastos de corbo
c/gastos consulares
d/honorarios
mandatario
a/fianza de buena
ejecución de mandato
situación financiera
disposición e.
Instalación

pabellon de
complacencia
abstención, indulgencia
a/acto y omisión

vigente
divisas
caducidad
a/cláusula de vencimiento
b/

falsificación

requerimiento

foire, salon, exposition
sort
a/s...d'un encaissement
b/s...des marchandises
défectueux
droit, taxe
a/annuité
b/droit d'encaissement
c/droit de chancelleire
d/honoraires
mandataire
a/caution de bonne
exécution de mandat
situation financière
agencements et
Installations

pavillon de
complaisance
abstention, indulgence
a/acte et omission

en vigueur
devises
déchéance
a/clause d'échéance
b/sans bénéfice de
ristourne
falsification

mise en demeure

fiere, salone, esposizione
esito, sorte
a/e...di un incasso
b/s...delle merci
difettoso
onorario, diritti
a/annuità
b/d...d'incasso
c/d...consolari
d/competenze, onorari
fiduciario
a/garanzia fiduciaria
situazione finanziaria
apparecchiature e
Installazioni

bandiera di comodo
omissione
a/atto e o...

in vigore
divisa
perdita, decadenza
a/clausola di d...
b/p... dei premi
contraffazione,
falsificazione
intimidazione, costituzione
in mora

Ĝuu la „Terminologian Ludon”!

Bedaŭrinde je la alvoko al „kunludo” en LN 16 paĝo 10 neniu reagis. Ankaŭ la „Letero al la Redaktoro” de Lorenc’ Mi sur paĝo 15 tiurilate ne havis iun efikon. Ni prezentas hodiaŭ pluan paĝon el la vortaro „Key words in international trade” de ICC – Ŝlosilvortoj en internacia komerco, de la Internacia Komerca Ĉambro. La proponoj por la Esperantaj terminoj faris s-ro Roland Rotsaert, Brugge. Li intertempe eĉ tradukis la tutan vortaron kun ĉ. 1500 nocioj. S-ro Wiersch, Welzheim, (IKEF 19) nia centro kaj kunordiganto por terminologia laboro, estas nun revizianta kaj amendanta la tuton. En kazo de diverĝo de iliaj opinioj ni serĉas ankoraŭ grupon de „juĝistoj”. Ĝis nun deklaris sin preta al tio s-ro Yamasaki (IKEF 43).

Prenu la apudan paĝon kiel provon. Skribu vian apinion pri la Esperantaj terminoj de Roland Rotsaert al s-ro Hans Wiersch, Tilsiter Strasse 39, D 7063 Welzheim, F.R. Germanio. Testu vian terminologian kapablon. Ĝuu la „Terminologian Ludon”!

Nova Eŭropa Dogandokumento

Ekde 1988, en ĉiuj landoj de la Eŭropa Komunumo estos uzata nur unu dogandokumento por importo kaj eksporto. Tiu „unika” dokumento anstataŭos dekojn de malsamaj formularoj, kiuj nun estas uzataj en la diversaj landoj de EK. Teorie, eksportisto de ekz. Danlando nur devos zorge plenigi unu tian dokumenton (tamen, ĝis 10-oble en iuj kazoj) kaj nur ĝi validos por akompani la varojn ĝis ekz. al la importisto en Portugalio, sen iu ajn plia dokumento. Ankaŭ en kelkaj ne-EK-landoj (i.a. Austrio, Svislando) validos la nova dokumento. Praktike, certe en komencperiodo, lokaj regularoj ankoraŭ ofte necesigos aldonajn formularojn. La doganistoj ankaŭ kreis novan terminon. „Importo” kaj „eksporto” estonte nur estos uzataj per komerco kun landoj ekster la EK. Por komerco inter membroj de la EK, oni uzos la vorton „forsendo”.

International Business Dictionary

in nine languages

Internacia komerca-ekonomika vortaro
en naŭ lingvoj

Planned, compiled and edited by
Projektitis, kompilis kaj redaktis | F. Munniksma

Under the auspices of
Sub aŭspicio de | Instituto por Esperanto en Komerco
kaj Industrio (EKI)
The Netherlands - Nederlando

KLUWER DEVENTER - ANTWERP 1975

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

Pagoj - Perantoj - Kotizo

Ĉiuj landoj

Poŝtĉekkonto belga (Bruselo): n-ro 000-1592629-83 kaj Konto ĉe Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, Nederlando: „ikef-e” je nomo de: IKEF, p.a. R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge

Perantoj

Britio

S-ro P. Foss, Long House Hotel, Pilton, Som., BA4 4BP

Francio

S-ro F.X. Gilbert, Vert Coteau, Longeville-en-Barrois, F-55000 Bar-le-Duc (CCP 1275-89 L Nancy)

FR Germanio

S-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, 7580 Bühl 16 (Volksbank Bühl 713104 - BLZ 66291400) Kotizo: 20 morkaj

Italio

D-ro M. Picasso, via De Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro

Jugoslavio

S-ro S. Taleski, ul. „Oslo”br. 12, YU-91000 Skopje

Hungario

S-ro Jozsef Horvath, Budapest (Sekretario de Ekonomikista Grupo de HEA) Varsányi Irén u.8. H-1027 Budapest

Koreio

S-ro Han Moo-hyup, CPO Kesto 5154, Seoul

Novzelando

S-ro John C. Rapley
31 Dakota Avenue

Beachhaven

Auckland 10, Nov-Zelando
Kotizo: 20 NZ-Dolaroj

Kotizo

400 belgaj frankoj
20 nederlandaj guldenoj

INTERKONATIĜO

a) Novaj membroj

Ni plezure bonvenigas novan membron el Nederlando:

60 S-ro Jurczynski, Jurek
Dries v.d. Vlerkstr. 17
NL-3063 RA Rotterdam

b) Teleksa komunikado kun la Financa Konsilanto

Nia Financa Konsilanto, s-ro Roland Rotsaert, Brugge, Belgio, havas interkonsenton kun firmao por uzi ĝian telekson. Jen la kodo: 82476 bcb b plus aldono de la nomo Rotsaert.

DONACOJ AL NIA KASO

Faris donacojn al nia kaso: Braun 1000 bfr, Mee 248 bfr, Rotsaert 216 bfr, Schneider 100 bfr, Wiersch 21 bfr.
Multan dankon al ili.

C) Identecŝildoj

09 Ulla Luin

Myggdalsvägen 123
S-135 42 Tyresö
- Ekonomisto ĉe libroeldonejo
- Lingvaj eblecoj: sveda, germana, ngla
- kompetenteco: libroeldonado en Svedio

27 D-ro Werner Bormann

Schärstr. 26
D-2050 Hamburg 80
- Diplomito pri ekonomiko, de 1957 ĝis 1977 docento pri ekonomiko en fakuniversitato, ŝtatoficisto en ministerio pri ekonomio nun
- estro de komerca kompanio, kiu prizorgas la komercan reklamadon en la publikaj stratoj en Hamburg

40 Bengt-Arne Wickström

Instituto por ekonomiko
Universitato de Bergen
Jonas Reins gate 19
N-5000 Bergen, Norvegio
- profesoro pri ekonomiko;
- lingvaj eblecoj: angla, germana, franca;
- kompetenteco: teorio pri la publika sektoro (teorio bonfarta, teoria ekonomia pri justeco, teorio ekonomia pri politiko);
- rilatoj: kun aliaj ekonomikistoj kun similaj interesoj.

42 Mensah B. Attiogbe-Agbemadon CEG de Zalive B.P. 134

Aneho, Togo
- Ĉefvendisto
- lingvaj eblecoj: franca, iom angla kaj germana,
- kompetenteco: komerca reprezentado;
- eksportaj deziroj-eblecoj: citronoj, kokosnuksoj, palmoleo;
- Importaj deziroj-eblecoj: ferproduktoj, aŭtoj, traktoroj, tekstilaĵoj, ŝuoj, nutraĵoj, paper-varoj, servoj de vojaĝ- kaj transport-agentejoj;
- rilatoj: kun firmaoj dezirantaj disvendi en Togolando, kun turismaj agentejoj.

45 Esperantotur en Britio

John Dickinson
Esperanto Domo
4 Casaba Terrace
Llanfoist
Abergavenny
Gwent NP7 9 NR
- Turista agentejo pri ĉiuj specoj de turismaj aferoj

Tiuj IKEF-membroj, kiuj ĝis nun ankoraŭ ne prezentis sin per identecŝildo, bonvolu sendi viajn tiurilatajn informojn al s-ro Gilbert, Bar-le-Duc, por ke ni povu ilin aperigi en LN 18.

Ekonomia agado de ne-ekonomisto en Hongkóng

Svarmas ĉiutage gemaljunuloj en la halo de la Bankoj en Hongkong. Tiuj geavoj, plimulto havas sesdek jarojn kelkaj el ili estas pli ol sepdek. Kompreneble ili jam ne laboras, ili estas pensiuloj.

Ili alvenas al la Banko je la 9a matene kaj hejmeniras je la 5a posttagmeze, ĉiutage, konscie kaj senrompe. Ĉu ili gajnas salajron? Ne! Ĉu ili estas devigita tion fari? Ne!

Ili faras la ekonomian agadon! Ili aĉetas alilandan monon de la Banko kaj revendas la monon al la Banko. Iu avino ŝerce diris: „Ĉitie (la halo de la Banko) estas mia „oficejo”, mi mem estas „oficestro”, pro tio, dum labor-horo mi devas ĉeesti, ĉar mi devas de tempo al tempo fari la decidon pri la negoco.”

Temas pri negoco, oni bezonas kapitalon. Jes, ili ĉiuj havas kapitalon. Kapitalo diversaj de HK\$ 10,000.000 ĝis pli ol HK\$ 300,000.00.

Ĉiu persono malfermas konton ĉe la Banko. Ili havas Hongkong-Dolar-Depon-Libron por deponi sian kapitalon, kaj ankaŭ havas aliajn Depon-Librojn por Usonaj dolaroj, Aŭstraliaj dolaroj, Novzelandaj dolaroj, Germanaj markoj, Japanaj jenoj ktp.

La negoco estas simpla, ili aĉetas alilandan monon de la Banko kiam kurzo de tiu mono al Hongkong dolaro estas malalta, deponi la aĉetitan monon al sia koncernata depon-Libro. Nun, oniatendas la pli-altiĝon de la kurzo por revendi al la Banko.

La Banko faras la anoncon pri la ŝanĝo de kurzo de tempo al tempo (eĉ po ĉiu minuto) per komputila aparato, tiuj geavoj pacience gardas la ŝanĝanta anoncon. Se dum la tuta tago la kurzo ne multe altiĝas, la alilanda mono aĉetita restas en sia depon-libro, kompreneble gajnos rentumon. La plej vigla aĉet-vendado estas Aŭstralia dolaro kaj Novzelanda dolaro, ĉar rentumo de tiuj dolaroj estas alta, ili kuraĝe riskas pro la malaltiĝo de la kurzo, ili gardas tiujn dolarojn ĝuante la altan rentumon, nur ĝin vendas kiam ili povas gajni bonan profiton.

Iu avino aĉetis NZ\$ 10,000.00 kiam la kurzo estas NZ\$ 1.00 = HK\$4.30, aĉetinte, kurzo de NZ\$ faliĝas, tamen post ĉirkaŭ unu monato, kurzo pli-altiĝas ĝis NZ\$ 1.00 = HK\$4.50, tuj ŝi vendas la NZ\$ 10,000.00 al la Banko, la gajno estas HK\$ 2,000.00 kaj rentumo HK\$ 1,000.00, entuta gajno estas HK\$ 3,000.00...tiu sumo estas unu monata salajro de gejunulo kiu laboras kiel oficisto. Ĉu ne estas bona negoco?:

Kompreneble, por tiuj kiuj havas pli grandan kapitalon, estas ne tre malfacila por gajni kelk-mil profiton da HK\$, eĉ nur dum kelkaj horoj!

En Hongkong, preskaŭ ĉiu scias pri la aĉet-vendo de Fremdlandaj monoj, kaj ja, multaj homoj gajnas bonan profiton. Pro tio, pli kaj pli multe da geavoj aktivis en tiu agado, kaj ili ja havas sufiĉan tempon por fari tiun profitdonan agadon.



Hygiene-Beutel

für

Damenbinden

Bitte nicht ins WC, sondern in den
Toiletten-Elmer werfen.

Bag for Sanitary Pads

Please do not throw in WC., but in the pall,
will be removed by chamber maid

Sac pour Bandes hygiéniques

Prière de ne pas jeter dans la WC.,
la femme de chambre les enlevera

Sacchetto -

Igienico per Fascie igieniche

si prega di non gettarle in gabinetto,
bensì di metterle in cestino toilette sarà
allontanato dalla cameriera.


Sāglik koruma kese kaĝitlari

Bayan Bezlerini lütfen WC atmayınız
Çöp Tenekesine atınız

Higiena saketo

por menstrusorbiloj

Bonvolu ne meti ĝin en la pelvon,
sed en la tiucelan ujon.
La ĉambristino forigos ĝin.



Ne nur gajnas profiton, pere de tiu agado, geavoj sentas la vivon pli agrabla, ĉar ili havas ion fari, koncentrigas sian penson pri la gajno, forgesante la maljunulecon, forgesante la malsancon, ili fariĝas pli juneca! Iu avino diris: „En la pasinta jardekoj mi sentas la vivon sensenca kiam mi estas sola ĉe la domo, la tuta vivo percis en miaj okuloj ĉian sencon kaj valoron. Nun mi sentas ĝojon, mi mem gajnas la monon, mi povas aĉeti la ŝtatan varon per mia persona mono!” Ŝajnas ke tiu ekonomia agado en Hongkong pli kaj pli kreskos!

Hongkong, Majo 2, 1987.

LEE Teck Shiu

Higiena saketo ankaŭ kun Esperanta surskribo

Franz J. Braun sukcesis konvinki la germanan firmaon IGEFA - liveranto de i.a. papervarojn -, ke ĝi surprisigu sur iliaj higienaj saketoj la tekson ankaŭ en Esperanto, krom germana, angla, franca, itala kaj turka. Per tio en multaj necesejoj en F.R. Germanio - en hoteloj, hospitaloj, publikaj domoj - vi povos iom post iom trovi tiajn saketojn kiel apude mont-ritajn.

LERNEJKOOPERATIVA MOVADO EN HUNGARIO

La junularo estas ege grava por la kooperativa movado, ĉar ĝi portos plue „la kooperativan flamon”. Pro tio ni fondas lernejkooperativojn.

Nuntempe en Hungario funkcias 600 lernejkooperativaj grupoj kun 60.000 membroj. Ĉi tio estas granda sukceso, ilia nombro en la lastaj jaroj rapide kreskis, ĉefe tiu de la lernejoj ŝparkaskooperativaj grupoj. Ekzemple en 1977 funkciis nur 60 lernejkooperativaj grupoj kun 7.000 membroj.

Kio karakterizas la lernejkooperativojn?

Ili funkcias en la bazaj, mezaj, kaj altaj instruaj institucioj kunige al la kooperativoj de plenkreskuloj, precipe al la ĝeneralaj konsumkooperativoj. Lastatempe oni fondiĝas kelkajn lernejkooperativojn ankaŭ en la agraraj kaj industriaj kooperativoj. Krome funkcias ankaŭ memstaraj universitataj konsumkooperativoj en urbo Pécs kaj en urbo Sopron. Eĉ en 1976 oni fondiĝas en Budapeŝto la kooperativon pri la „STUDENTA MODO”.

La taskoj de la lernejkooperativaj grupoj estas multflankaj. Konforme al la eduka agado ili helpas provizi artikolojn al la ĝelernantaro, kaj akiri la lernilojn kaj librojn necesajn por la lernado. Ili bone helpas al la junularo partopreni la socian, publikan aktivadon; ili edukas por la laboro, diskonigas la ideojn de la socialisma kooperado. Tiun disbranĉigantan agadon ili realigas surbaze de ilia aŭtonomio. Krome ili certigas realajn celojn por la profesio-elekto de la infanoj.

La lernejkooperativoj enkadre de la komerca aktivado funkciigas lernejajn vendejojn, bufedojn, kaj kadre de komisia agado ili disvendas lernolibrojn kaj literaturaĵojn. Kadre de la agrikultura aktiveco ili kultivas subfoliajn kaj surkampajn vegetaĵojn, florojn kaj plantaĵojn, grajnojn por semado; ili bredas kuniklojn, kolombojn kaj abelojn. En la industria, priserva laboro ili produktas ludilojn, ornamentajn skatolojn, presaĵojn kaj ceramikaĵojn. Pro tiuj agadoj funkcias lernejkooperativaj grupoj ankaŭ por flegi maljunulojn. Troviĝas ankaŭ 60 lernejoj ŝparkaskooperativaj grupoj enkadre de la Ŝparkaskooperativoj.

La lernejkooperativaj grupoj partoprenas ankaŭ la kulturan kaj amas-sportan movadon de la kooperativoj. Ili funkciigas ankaŭ popoldancajn ensemblojn, korusojn, muzikensemblojn, deklamgrupojn, pupteatrajn grupojn kaj belartajn fakrondojn.


La membroj de la lernejkooperativoj partoprenis la internacian kooperativan konkurson de infandeseĝnaĵoj kaj -pentraĵoj. Tiu ĉi konkurso estis sukcesa. Pro tio ni organizis novan konkurson sub la titolo: „Niaj kooperativoj”.

La lernejkooperativaj grupoj havas aŭtonomion (membrokunvenon, administran komitaton, kontrolan komisionon), kaj ili sendas proprajn delegitojn al la deputitkunsido de ilia patrin-kooperativo, nome al la kunsido de la kooperativo de plenkreskuloj. Ankaŭ la anoj de la lernejkooperativoj aĉetas „kooperativajn akciojn” kies valoro estas nur la dekono-kvinono de la baza akcio de la kooperativoj por la plenkreskuloj. Tamen ankaŭ la lernantaj kooperativanoj havas la samajn rajtojn en la kooperativoj.

En la kooperativoj de la plenkreskuloj helpas ĉiujn ĉi aktivecon de la junularaj komisionoj, la organizoj de la Komunista Junulara Asocio kaj flanke de la lernejoj la pedagogoj, la pionirtrupoj, respektive la lernejoj K.J.A-organizaĵoj. Tutlandnivele elformiĝis enhavriĉa kunlaboro por helpi la lernejkooperadon inter la Federacioj de la Kooperativoj, la Ŝtata Junulara Komisiono (nun Ŝtata Junulara kaj Sporta Oficejo), Centra Komitato de K.J.A, Pionir-Asocio kaj Kleriga Ministerio.

Ni havas bonajn kontaktojn kun Internacia Alianco de la Lernejkooperativoj (A.I.C.S.). Ni volonte fortigas la kunlaboron kun la franca Freinet-movado (I.C.E.M.), kun la polaj lernejkooperativoj kaj ĉiuj organizoj havantaj progresemajn tradiciojn en tiu tereno. Ni iniciatas, ke kadre de la lernejkooperativa movado kiel eble plej multaj homoj konatiĝu kun la Esperanto-movado. En tiu rilato ni havas bonegajn kontaktojn kun la pedagogoj, kiuj instruas ankaŭ la internacian lingvon en la lernejoj. Nuntempe ni havas 30 lernejkooperativajn grupojn, kie oni instruas Esperanton.

La Ministro-Konsilantaro en aprilo de 1986 decidis pri edikto, kiu helpas la disvastigon de la lernejkooperativoj enkadre de ĉiuj kooperativoj. Ni laboras por tio, ke laŭ tiu decido ĉiuj kooperativoj de la plenkreskuloj baldaŭ havu kontakton kun la lernejoj kaj provu helpi, kaj la kooperativa, kaj la Esperanto-movado man-en-mane aperu en ĉiuj lernejoj. Ni esperas, ke tiuj esperantistoj, kiuj ĝis hodiaŭ ne konis la lernejkooperativojn povos konatiĝi kun ili. La evoluo de ambaŭ movadoj povas alporti la dezirindajn komunajn sukcesojn.



**Ekonomia
Bulteno pri
Usono**

LINGVO: Esperanto Jarabono: US\$10--
(\$6 en N. Amer.) Abonadreso:
INTERFAKTO
P.O. Box 42205
Washington, D. C. 20015

KIRÁLY Lajos

REKLAMTARIFOJ:

A) por Membroj de IKEF:

unu anonceto ĝis inkluzive ses linioj: senpage; por pli 1 irpk longaj anoncetoj: po 1 respondkupono, (irpk), por ĉiuj komenciĝantaj ses linioj de 27 literspacoj. Ĉiam: unuope mendendaj.

b) por ne-Membroj de IKEF: po 1 irpk por ĉiu linio, aŭ por ĉiuj tri milimetroj de longeco, enkadrigita, sed kun minimumo de ok irpk-oj. Ĉiam antaŭpagita. Por anoncoj je pli granda larĝeco ol unu kolumno: laŭ aparta interkonsento. Ĉiam: tri aperoj de la sama anonco en sinsekvaj kajeroj por la prezo de du aperoj.

Kurzo: 1 irpk = 1,00 gld.

FOKUSO

En la antaŭa numero de Laŭokaza Novaĵletero vi jam povis legi pri la nova periodaĵo FOKUSO, kaj pri tio, ke tiun revuon prizorgas grandparte la hungaraj anoj de IKEF. Estis menciita ankaŭ tio, ke FOKUSO helpas al IKEF per publikigo de informoj pri ĝia agado kaj per aperigo de artikoloj pri ekonomiaj temoj.

Do, se vi havas interesan artikolon (ĉu originale Esperant-lingvan, ĉu tradukitan), taŭgan por publikigo en FOKUSO, ne hezitu sendi ĝin al: Ekonomikista Grupo de Hungara Esperanto-Asocio Budapest, Pf. 193. H-1368 Se vi ankoraŭ ne vidis FOKUSON-n, petu senpagan provekzempleron ĉe la sama adreso.

AL INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO (IKEF)

Financa sidejo:

S-ro Roland Rotsaert

Visspaanstraat 97

B 8000 Brugge/Belgio

ALIĜILO

Per tio ĉi mi/ni petas aliĝon al la Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF), kiel individua persono /entrepreno/ alia instanco. Mi/ni deklaras la intencon subteni la statuton de IKEF kaj finance kontribui al la mastrumado de la fakgrupo.

Nomo, sub kiu la membreco estiĝu:

Plena poŝtadreso.....

S-ro/S-ino/F-ino..... Jaro de naskiĝo/fondiĝo.....

Profesia okupo kaj agadkampo (j).....

Maniero de kotizpago

Aliaj rimarkoj.....

Loko/dato.....Subskribo.....